„Ковно-Эсперанто“ ⁂ „Kovno-Esperanto“

Журналъ Ковенскаго Общества Эсперантистовъ

* * *

Подписная цѣна: за годъ—1 р., за 6 мѣс.—60 коп. Пожизненные и дѣйств. члены К. О. Э. получаютъ въ Ковнѣ журналъ безплатно.

Адресъ редакціи: Ковна, Б.-Садовая д. Раца

* * *

Годъ третій

Цѣна отд. №—3 коп. въ пров. и съ перес. 5 к.,



№ 10 (36)

1914.

20 Іюня
3 Julio

Presorgano de Kovna Esperantista Societo

* * *

Abonprezo: Jare—1 sm., duonjare—60 sd. Dumvivaj kaj efektivaj membroj de K. E. S. ricevas la ĵurnalon en Kovno senpage.

Adreso de Redakcio: RUSLANDO. KOVNA Esperantista Societo.

* * *

Jaro tria.

Unu ekz.—3 sd., en provincoj—5 sd., eksterlande—7 sd.

От 10 до 30 №№ въ годъ. ◆ Dum la jaro 10-30 numerojn.

Текущій счетъ въ Ковен. Отдѣл. Соед. Банка (№ 916) и въ Esperantista Ĉekbanko.

Redakcia komitato: M. S. Valentinov, prof. A. A. Dombrovskij, P. D. Medem kaj A. M. Nedoŝivin.

ЧАСТЬ РУССКАЯ.
(Rusa parto).

Ковна, 20 Іюня.

Эсперантскій языкъ разработанъ и вполнѣ готовъ для всевозможнаго практическаго примѣненія: болѣе того, онъ вошелъ (хотя и въ ограниченныхъ еще предѣлахъ) въ практическую жизнь. Но объ этомъ знаемъ только мы, эсперантисты, а не широкая публика, не пресса, не правительства. На обязанности нашихъ всемірныхъ конгрессовъ, въ лицѣ полномочныхъ делегатовъ, лежитъ—объявить во всеуслышаніе, что процессъ созданія международнаго языка закончился, а затѣмъ настойчиво добиваться оффиціальнымъ путемъ примѣненія Эсперанто во всѣхъ областяхъ международныхъ сношеній.

Изъ эсперантской жизни

Испанія. О-во de Hispanaj Skoldoj постановило признать Э. оффиціальнымъ языкомъ для сношенія съ иностранцами.

Городская дума г. *Валенціи* снабдила городовыхъ, знающихъ Э., эсперантскими знаками.

Австрія. Въ Трентѣ основана Эсперантская ассоціація.

Болгарія. Извѣстный славистъ, профессоръ филологіи Софійскаго Университета Б. Зоневъ предложилъ сдѣлать докладъ на X-мъ всемірномъ конгрессѣ: „Что нужно сдѣлать, чтобы Э. было оффиціально принято международнымъ языкомъ“.

Венгрія. Э. преподается въ духовной семинаріи г. Эпереса.


Шотландія. 36 чел. получили свидѣтельства объ окончаніи Э. курсовъ.

Японія. Курсы Э. ведутся въ Токійскомъ Э. о-вѣ, въ центральномъ полицейскомъ бюро, въ почтовомъ училищѣ и въ метеорологической обсерваторіи.

Венгрія. Министромъ Народнаго Просв. разрѣшено преподаваніе Э. въ Будапештскомъ Коммерческомъ училищѣ.


X-й конгрессъ.

Во время конгресса будутъ происходить собранія: архитекторовъ, инженеровъ, фармацевтовъ, трезвенниковъ, слѣпыхъ, желѣзнодорожниковъ, учителей, католиковъ, докторовъ, рабочихъ, почтовыхъ служащихъ, полицейскихъ, журналистовъ, стенографистовъ, студентовъ, юношества, теософовъ, вегетаріанцевъ, писателей и др.



Эсперантская пресса.

Esperanto № 10—5 Junio, Парижскій Народный Университетъ—статья Е. Суше; *La Revuo* № 10. „Танго“ оч. В. Дорошевича и Поэтическія легенды Лапландіи Э. Странда; *La Suno Hispana* № 95—Дѣти, соч. Э. Д'Амичиса; *Orienta Azio* № 7 (31)—„Зеркало“, корейская легенда г. Х. Сакамото и интересный фельетонъ „Смѣшныя привычки Китайцевъ“; *La Zemuna Esperantisto* № 5 (29) „Три дня у сына“, прекрасный разсказъ съ Кроатскаго языка; *Fluganta Skribilo* №№ 6 и 7—Объявлены условія 1-го Эсперантскаго стенографическаго конкурса; *Amerika Esperantisto* № 4 (15)—„*Nella*“ или „Невѣдомый Путь“, новелла Э. Прива.



ESPERANTA PARTO.
(Часть эсперантская)

Kovno, 3 Julio.

La lingvo Esperanto estas ellaborita kaj tute preta por ĉiuspeca praktika aplikado: plie — ĝi penetriĝis (kvankam en mallarĝaj ankoraŭ limoj) en la praktikan vivon. Tamen, pri tio ĉi scias nur ni, esperantistoj, sed ne publiko, ne gazetaro, ne registaroj.


Do nepra devo de niaj universalaj kongresoj, kaj precipe de la rajtigitaj delegitoj, estas 1) laŭte proklami, ke la kreada procedo de lingvo internacia forpasis kaj 2) insiste klopodi oficiale pri aplikado de Esperanto en ĉiuj sferoj de la internaciaj rilatoj.



Kroniko de Kovna Esperantista Societo (Ruslando).

Lastatempe ni ricevis interŝanĝe la sekvantajn ĵurnalojn.

105. La Pulo (satira gazeto).
106. La Vie Sportive.
107. Okultismo—(dumonata bulteno).
108. Biblioteka flugfolio de G. D.



Esperanto en Ruslando.

„*Kovno-Esperanto*“ *tre petas sendi al la Redakcio mallongajn sciigojn pri gravaj okazintaĵoj el vivo kaj movado esperantista en Ruslando.*

Vladivostok. (Siberio). En kunveno de 34 Orient-Siberia regimento s-ro Pagirev faris paroladon pri E., post kio 40 oficiroj enskribiĝis por kursoj. La parolado estos repetita en 36 regimento.


Jaroslavl. La kursoj malfermiĝis en Demidova Jura Liceo (supera lernejo).

Grodno. En nia urbo estas aranĝita esper. rondeto ĉe Grodna Pedagogia S-to. Dum Pentekosto en E. ekskurso partoprenis Vilnaj esperantistoj.

J. Bogdanoviĉ.

Ekaterinoslavo. Ĵus fondita s-to E. intencas aranĝi lekcion pri E. kaj E. vesperon en popola aŭditorio.

Rossieni (Kovna gub.). Instruisto de loka agrikultura lernejo s-ro V. L Lukin tre sukcese propagandas Espton inter lernantoj kaj baldaŭ li esperas fondi rondeton.



Esperanto-kongreseto en la koro de Germanujo.


La 22/23 de aŭgusto en la bela urbeto Ebersvalde (tre proksime de la metropolo Berlino) okazos la 6 Ligotago de la Brandenburg Pomera Esperanto-ligo.

La famaj vidindaĵoj de l'mondurbo Berlino certe allogos multajn samideanojn, kiuj partopreninte la Parizan kongreson reveturos tra centra Germanujo. Por niaj en kaj eksterlandaj geamikoj ni preparos bonan akcepton kaj spertan gvidadon en Berlino.

La partopreno al tiu kongreseto postulos mallongan kaj agrablan veturadon. La ĉarma situacjo de l supre nomita kongresurbeto pleje rekomendas aliĝi al tiu kongreso kaj komuna ekskurso de l'grandurbaj kaj provincaj esperantistoj, (specialaj honoraj, loka kaj amuza komitatoj agrabligos la restadon en Ebersvalde).

Negermanaj interesuloj bonvolu peti informojn pri *senpaga* aliĝo de Ernst Vichert, Charlottenburg, Scharrenstr. 32a.

Eksterlandaj—kaj enlandaj samcelanoj revenantaj el Parizo vizitu ankaŭ Berlinon.



Bibliografia fako.

1) Naŭa Universala Kongreso de Esperanto. (Bern, 24—31 Aŭgusto 1913). Kajero dudek-sesa. (Majo 1914). Eldonita de Esperantista Centra Oficejo. Prezo 3 fr.

2. G. Davidov. Titolaro de esperantaj verkoj, tradukitaj el la Itala,—Latina—Greka — Portugala—Rumana literaturo. 1887—1913. Pr. 20 sd.

3. Carlo Bourlet. Paris. Biografio de fama mortinta E-to. Eld. Grupo Esperantista 51, rue de Clichy. 1914. Prezo 0,75 fr.

4. Esperanta Gvidlibro de Ĝenova (Italujo).

5. Rollet de L'Isle. Esperanto kaj turismo. Tradukis P. Georgievskij. Eldono de Esp. Bibl. de G. D. en Saratov.

6. S. P. Rantov. Международный языкъ и современная жизнь. Eldono de Esp. Bibl. de G. D. en Saratov.

Eldonoj de Esper. Biblioteko de G. D. en Saratov.

7. П. Е. Стоянъ. Языкознание и Эсперанто. Психологическ. очеркъ.

8. Stojan P. Славянство и Эсперанто. (Slavismo kaj Esperanto).

9. M. A. L. Feliĉulo. Forta impreso. Originala rakonto.

10. В. З-овъ. Искусственный языкъ (Artefarita lingvo).

11. П. Е. Стоянъ. Эсперанто передъ судомъ профессора.

III-a Tutruslanda Kongreso Esperantista.

1. III-a T. K. E. estas kunvokata en Moskvo de la 27a de Decembro 1914 ĝis la 2a Januaro 1915 j (malnovstile).

2. La kongreso estas kunvokata por komuna ellaborado de la plej bonaj rimedoj por disvastigi en Ruslando la helpan internacian lingvon Esperanton kaj por konatigi la rusan publikon kun la problemoj kaj jam atingitaj rezultatoj de la esperanta movado.

3. La preparajn laborojn pri aranĝado de la kongreso prenas sur sin la organiza komitato de la Kongreso.

4. La Kongreso estas malfermata de Prezidanto de la Organiza Komitato kaj estas fermata de Prezidanto de la Kongreso.

5. Kongresanoj povas esti ĉiuj favore rilatantaj al disvastigo de Esperanto, kiuj pagos la kotizon po 3 rubloj.

6. La raportoj kaj diskutoj dum la Kongreso povas esti farataj en rusa lingvo same kiel en Esperanto.

7. La dezirontaj fari raportojn en la Kongreso devas sendi siajn raportojn aŭ konspektojn (skizojn) al la Organiza Komitato ne pli malfrue ol la 1an de Decembro 1914 j.

Dum la Kongreso estos pritraktotaj jenaj demandoj:

1. Propagando de la lingvo Esperanto.
2. Enkonduko de la lingvo Esperanto en la lernokurson.
3. Organizado de periodaj kunvenoj de la rusaj Esperantistoj.
4. La kunligo de la agado de rusaj Esperantistoj.
5. Ellaborado de la normala regularo de Esperantistaj Societoj.
6. Praktika aplikado de la lingvo Esperanto en diversaj sferoj de la homara agado.

Nova libro.

„Pri solidareco inter esperantistoj“. A. Nedoŝivin. Tradukis B. Kotzin. Preso 10 sd.
Kun mendo sin turnu al Moskva librejo aŭ al Kovna Esp. Societo.

L. N. Tolstoj.

LA VOJO DE L' VIVO.
La vorto.
Tradukis Paŭlo Medem.
Prezo 10 sd. Estas aĉetebla en Kovna Esp. Societo kaj Moskva librejo.

Издатель *Ковенское Общество Эсперантистовъ.*
Редакторъ *М. С. Валентиновъ.*

Ковна, Электро-тип. „Х. Лейвандъ“

